

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Februari 1947

35 årg. Nr 2

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## Utbildningskurser i esperanto för lärare

I statsverkspropositionen till 1947 års riksdag förekommer följande proposition:

I anledning av i ämnet väckta motioner beviljade riksdagen för ett vart av budgetåren 1929/32 ett anslag av 2.900 kronor för anordnande av utbildningskurser i esperanto för lärare. Sedan 1932 års riksdag avslagit två motioner om fortsatt utgående av anslaget, synes något anslag för ifrågavarande ändamål icke ha beviljats.

Hos Kungl. Maj:t har nu svenska esperantoinstitutet — som är ett av Svenska esperantoförbundet, Svenska arbetaresperantoförbundet och Svenska lärares esperantoförbund bildat organ för studie- och examensfrågor — anhållit om statsbidrag med 5.000 kronor för anordnande under sommaren 1947 av instruktionskurser i esperanto för lärare vid svenska skolor. Till stöd härför har institutet anfört i huvudsak följande.

Under krigsåren har den internationella esperantorörelsen i likhet med andra ideella strävanden haft att kämpa med stora svårigheter i flera länder, medan den i andra länder, t. ex. Storbritannien, successivt ökat i styrka och omfattning. Sedan de mellanfolkliga förbindelserna efter krigets slut i växande grad kunnat återupptagas, har intresset för esperanto visat en snabb stegring. Utgivandet av böcker och tidningar har efter den nödtvungna återhållsamheten skjutit ny fart, den före kriget utomordentligt livliga esperantokorrespondensen över nationsgränserna har kommit i gång på nytt, och intresset för kurser och studiecirklar i esperanto befinner sig i stadigt växande.

I vårt land har esperantarbetet bedrivits oavbrutet under hela kriget trots frånvaron av den stimulans, som de internationella förbindelserna utgöra (utlandsresor, brevväxling samt utbyte av föreläsare, böcker och tidningar). Ett stort antal studiecirklar har varit i verksamhet, och varje sommar ha längre kurser anordnats på olika orter i landet. Dessutom har frivillig undervisning i esperanto med vederbörligt tillstånd förekommit i ett antal skolor, och erfarenheten av denna verksamhet ha varit mycket goda.

Med anledning av det starka intresset för språket, framför allt i folkbildnings- och lärarkretsar, har svenska esperantoinstitutet ansett tiden vara lämplig att återupptaga den med statsmedel tidigare bekostade instruktionsverksamheten. Under förutsättning av statsbidrag avser institutet att under sommaren 1947 anordna två lärarkurser à vardera 10 dagar med sammanlagt 50 deltagare och i huvudsak efter de tidigare

**Dr Karl Söderberg,**  
Svenska Esperanto-  
Institutets ordförande,  
hoppas få nöjet  
anordna instruk-  
tionskurserna.



prövade riktlinjerna. Undervisningen kommer att bedrivas med användning av s. k. direkt metod, och om möjligt ämnar institutet som kursledare inbjuda den internationellt kände esperantoläraren Andreo Cseh, vilken ledde den motsvarande under år 1929 anordnade lärarkursen liksom även en uppmärksam kurs i esperanto för svenska riksdagsmän.

Skolöverstyrelsen har, då de planerade kurserna syntes kunna i sin mån främja kontakten med andra länder, ansett sig böra tillstyrka utverkande av anslag för ändamålet med belopp, som Kungl. Maj:t kunde finna skäligt.

I likhet med skolöverstyrelsen har jag ansett mig kunna förorda, att statsunderstöd lämnas för ifrågavarande ändamål. Mot det begärda bidragets storlek har jag icke funnit anledning till erinran. Jag förordar därför, att i förslaget till riksstat för nästa budgetår uppföres ett anslag å 5.000 kronor för ändamålet. Det torde böra ankomma på Kungl. Maj:t att efter förslag av skolöverstyrelsen meddela närmare bestämmelser rörande anslagets användning. Jag hemställer alltså, att Kungl. Maj:t måtte föreslå riksdagen,

att till Utbildningskurser i esperanto för lärare för budgetåret 1947/48 anvisa ett anslag av kronor 5.000.

La Espero, Februaro 1947.

## La nomkolektado

Oni devas konfesi, ke la kolektado de subskriboj sur deklarioj, kiun iniciatis IEL, ne fariĝis tiu granda sukceso, kiun oni kredeble supozis, kiam oni komencis la laboron. Ni atingis unu kaj duonan centmilojn da subskriboj en la tuta mondo. Centoble tiom multe ni bezonus, por povi iom impresi.

Ni tie ĉi ne deziras paroli pri la plimalpli verŝajnaj kaŭzoj de tiu ĉi nesukceso. La okazintaĵo povas esti averto por IEL, estonte pli bone esplori la ŝancojn por entreprenado per ia demando ĉe la kluboj aŭ ĉe la landaj instancoj, antaŭ ol oni entreprenas tiom grandskalanan laboron. Oni ne flugu pli alten, ol la flugiloj povas porti.

Tamen, pripenso pri la afero kondukas al la konkludo, ke tiun ĉi entreprenon oni iamaniere devas provi plenumi. Ni simple ne povas lasi la aferon en tiu stato, en kiu ĝi nun estas. Kiel la bienulo Paavo ni devas fosi pli profundajn kaj pli multajn fosojn, por ke la falĉota tereno estu pli rikoltodona. Ni devas rekomenci la laboron. IEL havas konstantan kontakton kun UNO, kaj iom post iom ni devas veni al rezultato, kiu estas konsiderinda.

Por povi daŭrigi en la laboro, SEF presigis novan kvanton da deklarioj, kaj nun oni petas, ke ĉiu samideano laŭeble reprenu la laboron pri la nomkolektado sur la deklarioj. Petu nombron ĉe SEF! Certe ne ĉiuj, kiuj komprenas la valoron de la enkonduko de internacia lingvo, subskribis la deklaron. Dependas nur de la ebleco trovi la nesubskribintojn. La esperantistoj estas tro malmultnombraj, kaj la "ceteraj" estas tro multnombraj, por ke oni finfaru tian laboron en mallonga tempo. Do, oni devas decidi, iom pli daŭre dediĉi intereson al la afero. La malfacilaĵoj estos ne bagatelaj. Sed ni esperas, ke la samideanoj pro sia sento de solidareco denove ekokupos pri la afero, kaj ke ili ne finos tiun laboron, ol ni atingis la deziratan rezultaton.

Oso.

## I. A. P. K.

Bokstäverna i rubriken är uttydda Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj, på svenska Internationella Frimärkssamlareföreningen. Denna förenings mål är att stå medlemmarna till tjänst inom filatelin. I november 1946 hade föreningen 550 medlemmar, en siffra, som hastigt stiger. Föreningens tidning, La Universala Poŝtmarka Revuo, är spridd i över 50 länder. Den redigeras på esperanto, engelska och franska.

Vid föreningens årsmöte 1946 fick man inbjudan från Internationella Esperantoförbundet om samarbete. Man har redan förberett ett facksammanträde inom ramen av esperantokongressen i Bern i år. Föreningen har av kongressledningen erbjudits plats för en utställning. I denna utställning kommer Schweiziska Frimärksföreningen att delta. Frimärkssamlare världen runt ombedes låna ut lämpliga objekt för utställningen.

I Sverige har anslutningen ökat betydligt på sista tiden. Ett nytt högtintressant bytessystem, Inteks, erbjuder anmärkningsvärt stora fördelar. För upplysningar kan man vända sig till den svenske generalagenten hr Bertil Zell, Box 5085, Göteborg. Svenska Esperanto-Tidningens läsare ombedes att visa filatelister denna artikel.

## La kolegoj skribas

En multlegata kaj tre praktika gazeto — kiu instruas kaj amuzas, kaj nun ankaŭ plendas pri papermanko — mia ekzercita okulo rimarkis la sensacian novaĵon, ke sro G. H. A en H. nomis sian tre karan hundineton per la sonora esperantonomo Bela. Hura, al la venko! — Por ke al tiu gazeto ne manku kopio, mi, laŭ ties instigo, tuj transbaptis mian kanarion Naiva. Kaj, ĉar mi ne posedas jaĥton, oni baptis mian karbujon Malplena. Ĝi almenaŭ helpu plenigi la esperantogazetaron! (PIK en Flandra Esperantisto)

\*

Por vi blinduloj Esperanto signifas ja multe! En la blindulinstituto Deyl en Praha oni instruas esperante. En Ĉeĥoslovakio la blinduloj havas sian brajle presitan organon esperantan Aŭroro, kiun redaktas s-ano Vuk Echtner. Kursojn por blinduloj gvidas sino J. Blazková. Ĉian demandon respondas: Societo de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj Esperantistoj, Praha XIV, Soudní ul. 739. Samideanoj, informu viajn nevidantajn amikojn! (Esperantisto Slovaka)

\*

Sekve de malpermeso de fremlingvaj gazetoj en Brazilo naskiĝis la problemo, ĉu esperanto estas malpermesinda aŭ ne. La brazilaj juĝistoj decidis, ke esperanto kiel neŭtrala lingvo povas vivi en ilia lando pro tio, ke ĝi ne kontraŭas la spiriton de la leĝoj, kiuj celas eviti la formigon de fremdemaj centroj, kontraŭaj al la naciaj intereso.

(Verda Steleto)

\*

Inter la ĉefaj kaŭzoj de la militoj oni devas kalkuli al senliman financon povon de la registaroj, t. e. ilian rajton eldonadi devigajn atestojn pri kredito, ekzemple oficialajn obligaciojn kaj monbiletojn.

(Renovigo, Meksikio)

\*

La malfacilaj tempoj jam forpasis. Nun ni jam estas sufiĉe multaj por eldoni niajn proprajn librojn kaj gazetojn; sekve, iom post iom ni atingis la staton de matura estaĵo, kiu perlaboras sian propran vivon. Tre baldaŭ Esperanto estos kultura lingvo pli forta ol multaj lingvoj de malgrandaj nacioj, kaj povos kunprofito eldoni gravajn verkojn pri ĉiuj temoj por tutmonda disvendado. Kiam ni atingos tiun turnpunkton — kiam libroj en Esperanto vendiĝos pli ol en lingvoj de malgrandaj popoloj — nia celo estos trafita, ĉar ni tiam posedos kulturlingvon sufiĉe gravan por ke ĉiu inteligenta homo en la mondo devu lerni kaj uzi ĝin. Tiam ni povos atendi la Registarojn dum jarcentoj aŭ jarmiloj. Kaj tiu turnpunkto estas tre proksima. Ĝi estu nia unua celado! (O Brasil Esperantista)

## FÖRLAGSCHEFEN MEDDELAR:

Prenumeration å utländska esperantotidningar mottages av Förlagsföreningen Esperanto, Sthlm 19. Se annonser i föregående nummer.

Rättelse: Franca Esperantisto har höjt pren.-priset till kr. 6: — pr år.

Tillägg: Literatura Mondo kostar kr. 9: — pr år. Prospekt-nummer erhålles gratis från Förlagsföreningen. — Espero Katolika utges i Holland; pris kr. 6: 50 pr år. — Kompreni, Organo de Lyonaj Esperantistoj, kr. 2: — pr år.

Dessutom mottaga vid prenumeration även å övriga esperantotidningar, som ej särskilt annonserats. Begär prisuppgift

## Nyheter:

Infanoj en Toronto, del I, har nytryckts och kan därför båda delarna I och II nu erhållas. Pris tillsammans kr. 5: —. Se annonser i kommande nummer.

Pensoj de Zamenhof på 4 språk inkommer inom kort från Schweiz.

Utgivandet av ett av mästerverken inom den finska litteraturen — Aleksis Kivi: Sep Fratoj — är under förberedande av Eldono Vilho Setälä. S. W. Ahlm

## Lingva debato

### EĈ SE VI PENDINGOS MIN.

Kun granda ĝojo mi legis la artikoleon de s-ro Teodor Julin en la decembra numero de la Sveda Esperanto-Gazeto. Nu, mia ĝojo — kaj mia malĝojo — kutoj, sed ĉiu **sobra** esperantisto devas ĝoji pro tiaj supozeble tute malgravas en la diversaj lingvaj disvortoj. Pli frue "Salex" verkis similajn artikolojn, kiuj aperis en ĉi tiu gazeto.

Tiaj artikoloj montras la preskaŭ nekredoblan fakton, ke vere ekzistas esperantistoj, lertaj esperantistoj, kiuj kuraĝas rigardi "nian karan lingvon" ne nur per la okuloj de la perfekte homama homarano ("per la okuloj de la koro"), sed ankaŭ per la okuloj de la sobre pensanta ordinario ("per la okuloj de la cerbo"). Ĉar ni mem konfesu, ke esperanto ankoraŭ ne estas tiom perfekta...

— Idisto! Reformisto! Perfid...

Mi scias, mi scias! Sed memoru ke se ni esperantistoj mem ne kritikos nian propran lingvon (kiu estas artefarita, tio estas nerefutebla fakto), tiaokaze la neesperantistoj kritikos ĝin. Kaj ilia kritiko versaĵe ne estos tre milda. Ili ne respektos la sanktan netuŝeblecon de la Fundamento, por menciigi unu solan sed tute sufiĉan ekzemplon. Tiel, anstataŭ nia propra konstrua kritiko ni havos la detruan kritikon de la neesperantistoj. Kaj la nombro de la lertaj neesperantistoj ankoraŭ estas pli granda ol la nombro de la esperantistoj lertaj, nelertaj kaj mallertaj kune.

— Kion ĉi tiu sinjoro volas diri?

Simple tion, ke ni esperantistoj en nia moderna kaj racia tempo ne havu esperanton kaj la esperanto-movadon kiel ian religion. Zamenhof estas granda homo, certe unu el la plej grandaj homoj, kiuj iam vivis, sed li ne estu al ni ia sankta dio. Prave diras s-ro Julin, ke ankaŭ genio estas homo. Same la esperanto-lingvo mem ne estas ia netuŝebla diaĵo.

-- Sed se kiu ajn nekompetentulo ekŝanĝus esperanton laŭ sia tute privata opinio...

La nekompetentuloj ne ŝanĝu ion ajn. Cetere, eĉ ne la kompetentuloj trovos ŝanĝojn necesaj. (Tion mi nur supozas, kompreneble, ĉar ne estante kompetentulo mi ja ne povas scii tute certe.) Sed ĉio homa estas — bedaŭrinde — neperfekta sed samtempe ankaŭ — feliĉe — plibonigebla, almenaŭ ĝis certa grado. Kaj ankaŭ esperanto estas ordinara homa kreaĵo. Nur tion mi volas diri.

Jes, aldone mi ŝatus diri: Ni esperantistoj rigardu nin mem iom pli kritikeme ol ni ĝenerale faras. Ni ofte kritikis kaj mallaŭdas la ŝovinismon kaj la fanatikecon de niaj proksimuloj, sed vere ni bezonas ekkritiki ankaŭ la ŝovinismon de la Esperantujanoj kaj nian propran lingvan fanatikecon. Kelkfoje ni kondutas ridinde. Mallonge: ni sobriĝu.

Se iel eble, ne pendigu min. Mia opinio ja estas tute sensignifa.

Saz-u-Kaim.

### RESPONDO AL M. C. BUTLER.

Mi bone komprenas ke dissendo ne estas sinonima al "brodkasto" aŭ radiodissendo. Same stacio ne estas sinonima al radiostacio. Sed anstataŭ "la radiostacio dissendas esperantoprogramon" oni povas diri ke "la stacio dissendas (aŭ eĉ sendas) ...", se ne estas dubo ke temas pri radio. Do laŭ mia opinio radiodissendo estas la plena vorto, dissendo mallongigo uzebla en la plej multaj kazoj. "Brodkasto" tute ne estas internacia, kaj mi same protestus kontraŭ "rundfunko". "Brodkasto" povus esti kasto kiu bródas. En la radioterminaro recenzita oni cetere klare preferas la vorton dissendo.

Antaŭ ol diskuti vorton oni povas unue rigardi en Plena Vortaro. Tie flosi estas netraktivita, sed en rimarko oni diras ke "Z uzis kelkfoje la formon flosi kiel transitivan anstataŭ flosigi". En PV flosilo estas "objekto aŭ ilo kiu flosas, servanta por montri nivelon aŭ rapidecon de fluo, aŭ por subteni ion en akvo". Se la Akademio volas deklari ke flosi estu transitiva kaj aprobi la vorton floti por la netraktivita signifo mi tute ne havas ion kontraŭ tio, sed mi ne proponas.

En Internacia elektroteknika vortaro staras r a d i o-

disaŭdigo kaj radiofonio. La unua estas peza kaj el logika vidpunkto iom dubinda, sed radiofonio estas laŭ mia opinio tute aprobinda kiel sinonimo.

Salex

### LA APOSTROFO!

Terura skandalo! Iu pedantemulo ekrimarkis, ke La Espero apostrofis sen apostrofo! Kontraŭfunda-menta ago, kiu minacas ruinigi nian lingvon!

Sed, ĉu ni neniam estos maturaj lasi la elementan lernejon? Ĉu la maldormantaj gardistoj de la Fundamento vere estas tiel blindaj, aŭ ĉu ili estas tiel formalaj, ke ili vere ne rimarkis, ke nia lingvo en multaj okazoj transpasis la limojn de la Fundamento, la aferojn, kiuj estas antaŭviditaj kaj rekomenditaj en ĝi? Nome, en okazoj pli nevideblaj: delikataj esprimoj, uzoj de la prepozicioj kaj deriviloj, kaj multaj aliaj.

Ĉi tiu demando pri la apostrofo estas rigardenda el jena vidpunkto: Kiam esperanto estis juna kaj ĉiuj estis komencantoj, aŭ almenaŭ ĉio en la lingvo devis esti farata kun konsidero de la komencantoj, oni eĉ propagandis, dirante, ke ĉiu esperanta teksto estas komprenebla sen antaŭaj studoj per la helpo de malgranda vortaro kun klarigo de la gramatikaj elementoj. Pro tio diras la 11:a paragrafo de la fundamenta gramatiko (traduko el la germana teksto en la kvinlingva eldono de 1918): "Kunmetitaj vortoj estiĝas per simpla kunigo de la vortoj, dum oni distingas ilin per **altestarantaj streketoj**". Nur piednoto klarigas, ke la streketojn oni povas forlasi, se la leganto jam sufiĉe konas la internacian lingvon. — Tute de sama valoro kaj nivelo estas la regulo 16:a en sia lasta, formala parto. Ĝia celo estas faciligi al komencanto la legadon de esperanta poezio.

Sed poezio ne estas por komencantoj kaj elementuloj. Certe, versaĵoj povas kelkfoje esti taŭgaj en la lingvinstruo — en ĉiulingvaj lernolibroj por infanoj oni uzas versaĵetojn. Kaj ankaŭ tiuj povas kelkfoje pretendi la subliman titolon de arto.

Esence, tamen, la arto signifas liberigon de katenoj. Arto estas ofte genia rompo de la reguloj de ĉiutaga vivo kaj lingvo. Se nia poezio ne kuraĝas paŝi tiun vojon, ĝi neniam estos suverena arto.

Tiel, la demando pri la apostrofo kreskas super la limojn de ĉi tiu per si mem bagatela problemo.

Mi estas de la opinio, ke la apostrofo estas tipografie ĝena kaj malbela. Tial mi salutis la elpenson de La Espero forlasi ĝin. Iu povas havi alian opinion. Li volu konstante uzi la apostrofon. Tio ne ruinigos nian lingvon. Kaj neniu, kiu kapablas legi poezion — ne nur instruajn versaĵojn — estas misgvidata per tio kaj havos malfacilaĵojn ĉe la legado de la poezio.

Certe, estas kelkaj okazoj, kie la senapostrofa elizio de la finiĝo povus kaŭzi miskomprenon — ekz. mino, vino, lino, sino — sed estas la tasko de la poeto eviti tiujn. En aliaj erarigaj okazoj jam la ritmo sufiĉas por leganto, kiu komprenas poezion, kaj precipe ĉe deklamo. Tiaj rifoj estas entute nur kelkaj dekoj, kaj la malĝusta legado plej ofte kondukas al tiel ridinda eraro, ke nur malsaĝulo povas ĝin gluti. Ni prenu ekzemplon el la "Piramida kanto" de Uuno Kailas:

Laŭ sia mezuro ĉiu  
piramidon estigos pli,  
kaj en la interna kavo  
ja baldaŭ dormos ni  
silente, laŭ faraonoj,  
kiel raŭpo en la kokon.  
Piramido staradas, vidatas.  
Faraonon kaŝos nekon.

Se iu nun pensas, ke ni "dormos kiel raŭpo en la kokon" anstataŭ "raŭpo en la kokono", krom ritmo estas al li fremda la uzo de akuzativo kun lokaj prepozicioj, kaj krom tio li havas tre abnorman imagon; eble ankaŭ la vorto "kokono" estas nekonata al li. Simile ni povas konjekti pri "nek-on" (!) anstataŭ "ne-kono". Kaj en ĉiuj okazoj — krom pro la abnorma imago — li povas reveni al la elementa kurso kaj nur poste komenci legi la poezion.

Estas tute aparta la demando, kiam elizii la finiĝon, kiam ne.

Vilho Setälä.

## Apartemento por lui

### ESPERANTISTO PREFERATA.

Reklamon kun proksimume la enhavo de la rubriko oni povis antaŭ nelonge legi en gotenburga gazeto. Kio do sin kaŝas malantaŭ tia reklamo?

Ja, la afero estas tiu, ke la gotenburgaj esperantistoj ne havis ian ejon por siaj kunvenoj. Niajn plendojn aŭdis samideano sro Karl Vilborg, kaj li ekpensis pri la problemo. Post iom da tempo li venis al propono.



Sro Karl Vilborg, pro kies donacemo la gotenburganoj ekhavis esperantan hejmon.

Li prenis la telefonan parolilon kaj interkontaktiĝis kun kelkaj aliaj esperantistoj. Li petis nin veni kaj nin kondukis unue kelkajn ŝtuparojn supren de Linnégatan, trans korton kaj du ŝtuparojn malsupren en kelon, kies muroj estis vera fortikaĵo. Ĝi ankaŭ servis kiel bombŝirmejo dum la milito.

Sro Vilborg demandis nin, ĉu ni opinias, ke ĉi tie povos fariĝi renkontejo esperantista. Fakte ni ne sciis kion respondi. Multe ja dependis, kiom da mono oni intencis spezi en la afero. Estis sufiĉe multe da rezonado tien kaj reen, sed, por fari longan rakonton mallonga: sro Vilborg ordonis la necesajn laborojn, li ekipis la ejon per ĉia bezonata porcelano kaj cetera manĝilaro, li enkondukis akvon kaj elektran lumon, aĉetis fornojn kaj hejtmaterialon, kolorŝmiris kaj tapetumis. Kaj artpentristo Ivan Broberg tie pendigis nombron da siaj pentraĵoj, kaj nun la gotenburgaj esperantistoj havas ejon por siaj kunvenoj. Sro Vilborg ĝin senkoste disponas al ni, kaj por havi interesitan gardanton de la ejo, li decidis forlui la venontfoje liberan apartementon en sia domo al esperantisto. Tial la reklamo menciita ĉe la komenco. La esperantistejo gotenburga fariĝis vere intima. Nun estas la deziro de sro Vilborg, ke ĉiuj esperantistoj sin sentu hejme tie. Li ankaŭ havas esperon, ke la ejo povos en certaj okazoj servi kiel tranoktejo por vojaĝantaj esperantistoj el eksterlando.

### ELDONO VILHO SETALÄ.

Eldono Vilho Setälä estas la nomo de nova Finnlanda libroeldonejo. La fondantoj de la eldonejo decidis nomi ĝin LIBRARO Vilho Setälä, kaj tiel estas presite sur la kovrilo de la unua libro. La ŝtata registristo tamen postulis, krom aldono finnlingva, preciziganta la juran formon de la societo, ŝanĝon en la nomo mem.

La unua eldonaĵo estas Spegulo Homarana de J. H. Erko kaj la eldonejo preparas la eldonon de la ĉefverko de Aleksis Kivi: Sep Fratoj.

## La infaneto

En frua pratempo infaneto naskiĝis. Kiuj estis ĝiaj gepatroj? Eble neniu sur la tero tion vere scias. Kelkaj diras, ke la Diablo mem estas la patro, sed aliaj asertas, ke la anĝeloj de Dio donis la infanon al la homaro. Nu, ne sciante pri la deveno de la infano kaj ne scinate pri la estontaj faroj de ĝi, la homoj prenis zorgon pri la sengepatra etulo. Kvankam la malgrandulo ofte montris strangan kapricon kaj ludemon, la homoj bone zorgis por ĝi kaj gardis ĝin. Kial mi nomas la etulon "ĝi"? Jes, ĉar mi ne povas certe konstati la sekson de tiu ĉiam infanaĝa estaĵo. Ĉu vira aŭ virina? Vi povas mem decidi. Ne atentante pri ia sekso de la infano la homoj nomis ĝin Amo.

Do, tio okazis, ke Amo aperis inter la homoj. En diversaj popoloj ĝi ricevis diversajn nomojn kiel Eroso, Peko, Amorino k.t.p., sed malgraŭ la diversaj nomoj ĝi restis tute la sama, la diido (aŭ diablido), kiu konfuzigas la animojn de la kompatindaj homoj, igas viron surgrimpi la altegan alpon por havigi al sia amatino la admiratan floron Edelvajso, malfeliĉigas la jam edziniĝintan virinon, kiu trovis, ke ŝi tro urĝiĝis, aŭ ĝi igas la virojn esti infanoj, ludantaj antaŭ la piedoj de la virinoj.

Jes, tre danĝera estas tiu infano por viaj animoj. Sed se oni pli profunde pripensas la aferon, ĉu oni tiam ne trovas, ke la infano estas naskita de la homo mem? Ĉu ne la homo estas miksaĵo inter dieco kaj diableco? La homo mem deziras ĝuste tion necertan, kion donas la Amo. Homo kiu amas, vere amas, ĉiam posedas animon batalantan kontraŭ la malfacilaĵoj, kiuj kontraŭstaras lin. La Amo donas belan koloron al la animo. Sed ĝi ankaŭ povas doni belan doloron. Ĉu ni homidoj iam en la estonto komprenos nian infanon? La knabino, kiu ricevas etan puŝon de la Amo kaj poste sen ia pripenso sin ĵetas en korpajn orgiojn kaj kredas, ke tio estas Amo, ĉu ŝi komprenas Amon? Ankaŭ la viro, kiu nur ludas per la knabinaj koroj kaj ankaŭ post la uzo traktas ilin kiel ludilojn, ili disŝiras ilin kaj forĵetas ilin, estas tute sen kompreno por la kompatinda infano Amo. La infano certe ne volas tiujn agojn de siaj karaj gepatroj.

Vi homoj, kiuj naskiĝas ĉirkaŭataj de ridantoj, vivu tiel, ke vi mortos cirkaŭata de plorantoj. Tio signifas ke vi amu la mondon kun ties kompatindaj enloĝantoj. Amu ilin tiel, ke vi estos vera perdo por ili, kiam vi malaperos. Eble tiu penso ŝajnas iom kruela, ke oni faru funebbron al la kunvivantoj, sed ĉu ne estas pli facile porti enkoran pardonon ol malamon al tiu homo, kiu vivis kaj nun finfine mortis? Oni nun demandas: "Kiam granda mondkrimulo estas kondamnita pagi siajn ŝuldojn per sia vivo, ĉu ni ploru ĉe lia tombo?" Jes, kial ne? Ni ploru pro tio, ĉar la krimulo neniam en la vivo kapablis konatiĝi kun la ĉarma infano Amo. Ni priploru tion, ke ni aliaj estis tro malfortaj por haltigi tiun krimulon en liaj malicaj agoj. Kial li iĝis krimulo? Eble estas via kulpo? Eble la juĝinto mem kulpas pri tio!

Tiu infano, kiu havas tiel multajn formojn, ĝi devas esti adoptinfano de ni ĉiuj. Ni, la homidoj, estas unu granda familio kaj ni kune donu la plej valoran edukon al nia kara infano. Ni zorgu pri ĝi tiel, ke ĉiu homo estos vokata de tiu feliĉiga ĉarmuleto. Ĉiu homo devas senti tiun belan, mirindan senton: ami per la tuta, plena koro. Ne nur viajn familianojn vi amu sed la tutan homaron! Vi lernas lingvojn, matematikon, fizikon k.t.p., sed ankaŭ lernu la Amon! Komencu nun tuj, por ke vi ne estu tro malfrua. Vi tute ne devas aparteni al ia religia sekto por esti bona amanto de la homaro. Via religio povas esti nur neŭtrala opinio pri tio, ke la Amo estas utila rimedo por savi la vunditan, sangoplenan mondon.

Do, iru kaj ekagu!

Reo.

## OPINIO RECENZISTA

**VIVO VOKAS** de Stellan Engholm. Stelo-Libro n:º IV. Eldona Societo Esperanto, Stockholm 19. sv. kr. 7.25 bind., 6.50 broŝ.

Bedaŭrinde, eĉ domaĝe mi ne legis la du antaŭajn volumojn de la rakonto pri la "infanoj en Torento", kaj pro tio mi malgraŭ la enkondukaj vortoj de la aŭtoro kelkfoje iomete konfuziĝis dum mia legado de la tria. Sed eble ne tro multe gravis, ĉar mi iam kun tre granda intereso, multfoje, eĉ kiel kurslibro trastudis la belan novelon Al Torento, kies simpla kaj kortuŝa rakonto pri sopiro kaj amo la unuan fojon atentigis min pri nia simpatia verkisto en Ludvika kaj pri la ferindustria vilaĝo de li tiel ofte priskribita.

Nun leginte la romanon Vivo vokas, mi devas konfesi, ke la rakonto parte ŝajnas al mi tre, eĉ tro simpla. En la unuaj ĉapitroj nek la medio, nek la naturo, nek la personoj sin prezentas al ni en tia konkreta, viva kaj viviga maniero, ke oni povas paroli pri esencaj literaturaj kvalitoj. Ankaŭ la longa feria veturado per bicikloj, kiun faras kvar el la gejunuloj, aspektas laŭ mi kiel pli pedagogia ol poeta afero — eĉ se mi ne povas nei, ke la aŭtoro donas belegan bildon de la ruĝkolora Strängnäsa katedralo, ŝvebanta kvazaŭ miraĝo en sia verda ĉirkaŭaĵo alte super la eta urbo. Kio verŝajne ankaŭ iom ĝenas la leganton kaj precipe la kritikanton estas la komponado de la romano, per kiu kelkaj personoj, ekz. Arne la pentristo, kaj Brita, la juna altklasulino, nur operacias en la kulisoj kaj pro tio iom perdas tiun homan intereson, kiu vere devas aparteni al ĉiu persono en bone komponita romano.

Sed tamen — la finimpreso de Vivo vokas ne estas, absolute ne estas malbona, malagrabla aŭ seniluziiga. Estas tri partoj de la rakonto, kiuj forte kaptas nian tutan intereson kaj intertempe eĉ forte premas nian koron. Unue la priskribo de la fruprintempa promenado de Johano kaj Alda, dum kiu ili travivas la tutan belon de la naturo sub la kolorigaj radioj de la vespera suno kaj samtempe ekkomprenas la amon unu al la alia, due la epizodo pri Eriko, la silentema librovermo, kiu subite eliras en la hispanan militon nur por veni returnen kun akra sento de seniluziigo kaj senespero, kaj trie la interna evoluo de Ajna, kiu amas lin kaj dum lia foresto migras la vojon tra tuta psika apatio ĝis la konsolo apud la piedoj de la longe forgesita "bona paŝtisto". Tiuj ĉapitroj vere donas valuton por la tuta prezo de la bele presita kaj bele dekorita volumo, kaj estas tiaj ĉapitroj, pri kiuj ni memoros longe post la legado.

Tio ja ne signifas, ke oni ne povas diskuti ankaŭ pri la ĉefpartoj de la romano. Unue: mi ne estas entuziasmulo pri seksaj aferoj sed tamen devas demandi, ĉu la priskribo de la amaferoj de tiuj-ĉi gejunuloj estas efektive vera? Ĉu dum niaj tagoj entute ekzistas erotiko, tiamaniere preskaŭ netuŝita de la sekseco entute? Ĉu estas principo flanke de la aŭtoro aŭ ĉu li per tio volas doni bildon de nia hontema kaj retenata popolo, al kiu apartenas liaj junaj kaj — almenaŭ krom la nacisocialisto — tiel simpatiaj personoj? Oni almenaŭ demandas sin mem pri tio.

Alia afero: Ne kiel kritiko sed kiel prezentado de mia propra vidpunkto mi volas konstati, ke mi ne povas kompreni la pesimismen de Eriko. Li ja faras sian absolutan devon elirante en la hispanan militon! Certe li tie ekkomprenas, ke la militoj efektive ne koncernas la individuan homon sed nur la organizojn, certe la aŭtoro per liaj vortoj kaj pensoj tuŝas gravan problemon, sed laŭ mi li donas al ĝi tre malklaran solvon.

Klara tamen estas la lingvo. Mi ne estas spertulo pri tiaj aferoj kaj volonte transdonas la lingvan kritikon al pli severaj fundamentistoj. Mi estas kontenta, kiam la frazoj fluas bone kaj bele — estas ja ne la kulpo de Stellan Engholm, ke esperanto malfacile po-

vas esprimi speciale dialektajn trajtojn kaj apenaŭ havas vortojn por ĉiuj svedaj blasfemoj.

Entute: interesa, rekomendinda volumo por legado, diskutado kaj kritikado.

B j. B e c k m a n.

**J. H. ERKKO: Spegulo homarana por koroj maljunaj kaj junulaj.** (Esperantigita de Vilho Setälä. Eld. Eldono Vilho Setälä, Helzinki. Mendebila ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm 19. Prezo 0.75 kr.

Tiu ĉi ege plaĉa kaj noble prezentita libro (ornamita per la ilustraĵoj de la fama finna artisto Akseli Gallen-Kallela, prezentas la t.n. "hejman regularon" de la finnoj por vekti la justosenton kaj moralan forton en la popolo finna en tre koncize kaj frapante formitaj senrimaj versoj. La vortoj de la verkisto, kies vivo finiĝis en 1906 estas eterne valoraj kaj universale gravaj, tiel ke ilia inda esperantigo estas tre bonvena. Pri la indeco garantias la nomo de V. Setälä, kies "senkatena" redono estas farita kun tiom da amo por la verketo, ke la rezulto povis esti nur tre bona. Ni atendas kun intereso la sekvajn verkojn de la serio.

La libreto estas pruvo de la klopodo laŭeble elimini la apostrofon el la esperanta verso, ne tiel, ke oni ŝanĝas la metrikon de la originala verko, sed kun la konstato, ke la prozodio donas la percepton pri la substantiveco de la vorto, oni teknike forigas la apostrofon. Tiu maniero jam vekis multe da diskutoj kaj multe da vortoj fluis el diversaj plumoj por kaj kontraŭ. La plej grava argumento kontraŭ tio maniero estis, ke ĝi estas kontraŭfundamenta, sed certe ankaŭ tiu opinio ne povas esti indiferenta, kiu ne kontentigas nur per la vortoj de la Fundamento, sed citas ĝian spiriton. Estas tute certe, ke tia, eta kaj bagatela, pure teknika artifiko (ĉar ŝango ĝi ne estas), aliflanke favora el pluraj vidpunktoj, certe havus la aprobon de la Majstro, se li vivus. Supozeble ankaŭ s-ano Setälä havis la saman penson kaj ŝajne la vivo donos sian benon al tiu penso. La tendenco gajnas de tago al tago pli kaj pli da esperanto-organoj kaj poetoj kaj estus tre interese ricevi la opinion de la Lingva Komitato pri tiu ĉi afero, por ke la diskuto ne ŝlimiĝu.

F. S.

**MALGRANDA REVUO**, nro 4 de 1946. — La moderna civilizo portas en sia propra sino diktatoran revon. — La plej malaltaj homaj triboj staras vere proksime al besteco ankaŭ en sia memkonscio, ekzemple negroj de la plej malalta nivelo rigardas la simion kiel pli altan estajon. — Ŝtatoj ekzistas por la militoj. — Por li ne nur spaco sed ankaŭ tempo estas multdimensia.

Mi ne volas recenzi la kvaran numeron de Malgranda Revuo. Sed la supraj frazoj estas ĉerpitaj diversloke el la kajero. Se ili tiome povas tikli vian scivolemon, ke vi aĉetos la nomitan revuon, la celo estas atingita. Ĝi vere meritas legadon pro sia varia kaj serioza enhavo.

Oso

**MI SERĈIS ORON KAJ OLEON SED TROVIS . . . . .** de David Flood 132 paĝoj. Prezo kr. 6.75 bind., 6.— broŝ. Eldona Societo Esperanto, Stockholm 19.

La aŭtoro enkondukas nin en la tempon de la vekigantaj laboristaj organizaĵoj je la komenco de la 20-jarcento, kiam la vivkondiĉoj en Svedujo estis tiel malfacilaj, ke multe da gejunuloj dirketiĝis Usonon, por trovi tie la prosperon vane serĉitan en la patrujo. La ĉefa parto de la bele prezentita verko pentras proprajn kaj alies travivaĵojn en la oleokampoj kaj orkampoj de Kanado, Usono kaj Alasko, kie la aŭtoro estis multfoje vid'al vide de la morto, sed mirakle saviĝis. La amuziga rakonto, kiu ofte atingas ne kutiman drameton, donas al la leganto trafan bildon de la pionira tempo. . . . (Kurt M. en Argentina Esperantisto)

**ORAJ KONSILLOJ POR TROVI BONAN EDZ(IN)-ON.** Mendebila ĉe H. Salokannel, Kyrö, Finnlando. Prezo 5 f. m.

La konsiloj ne estas sen senco. Sed . . .

A d i l.

## Kroze tra la lingvo

Sub tiu ĉi rubriko ni dum iomdaŭra venonta tempo publikigos lingvajn artikoletojn. Ni esploros la devenon de interesaj esperantaj vortoj, ni vagos tra nia lingvo por ekvidi novajn perspektivojn de ĝi, kaj ni provos iom vastigi kaj profundigi niajn sciojn pri esperanto. Ni ne konsideros esperanton kiel izolitan objekton, sed ni rigardos ĝin tia, kia ĝi estas — kulturlingvo en la rondo de kulturlingvoj. Esperanto ne estas arbitra artefarita produkto — ĝi ja estas parenca al la naciaj lingvoj kaj pruntis sian vortaron el ili. Do tio ĉi estas la celo de nia nova artikolaro: regali vin per diversspecaj faktoj lingvaj, en formo nepretenda. La serio de artikoloj ne havas specialan sistemon metodon. Ni iros tien, kien tiros nin nia — kaj via — intereso. Ni, per malmultaj vortoj, vagos "kroze tra la lingvo".

### La hindoeŭropa pralingvo.

La lingvofamilioj ĝermana, latina, slava, kelta, greka, persa kaj hinda ĉiuj estas parencaj unu al la alia. Ili kutime estas nomataj la hindoeŭropa lingvogrupo, ĉar la nunaj teritorioj de la grupo sin etendas de Eŭropo okcidente al Hindujo oriente. Ĉi ĉiuj lingvoj devenas de unu prahistoria lingvo, kiu estis parolata je pluraj jarmiloj antaŭ Kristo. La scienculoj disputas pri tio, kie tiu pralingvo estis uzata. Oni proponis interalie la regionojn ĉe Balta Maro kaj la grandajn ebenaĵojn interne de Azio. Komprenibile ni ne posedas skribajn restaĵojn de tiu lingvo; ĝi povas esti rekonstruata nur per komparado de la vortformoj en pli novaj lingvoj. Tiu komparo ebligis la starigon de nova scienco, la komparanta lingvistiko. Ekzemple la komparo de la formoj: germane *varm* *v a r m a*, latine *for* *n u s f o r n o*, greke *thermos* *v a r m a* kaj sanskrite *gharma* *v a r m a* montras al hindoeŭropa praformo *ghormo-* kun la signifo *v a r m a*. En tiu ĉi kolono ni ofte okupos nin per hindoeŭropaj vortradikoj, studante iliajn derivaĵojn kun speciala konsidero al la esperantaj formoj. Nia unua studobjekto estos la radiko *ank-*. Ĝin ni studos sub la rubriko

### De anglo al angulo.

Ĉu vere la esperantaj vortoj *a n g l o* kaj *a n g u l o* estas parencaj? Jes, kaj jen kiel: La hindoeŭropa radiko *ank-* havas la signifon *f l e k s-*, *k u r b-*. Ni trovas ĝin en multaj diversaj lingvoj kun tiu aŭ simila signifo. Venintaj en esperanton per la latino estas du tiaj vortoj: *a n k r o* kaj *a n g u l o*, kiuj do ambaŭ ricevis nomon pro sia fleksiteco. En orienta Slesvigo troviĝas duoninsulo, kies formo ŝajnis al ĝiaj loĝantoj simili al hoko. Ili tial nomis ĝin *A n g u l*. El tiu regiono elmigris en la kvina jarcento post Kristo la *a n g l o j* — tiel nomataj laŭ la duoninsulo — kun la ĉirkaŭ Elbe loĝantaj saksoj. Kiel ni ĉiuj scias, ili konkeris Britujon, kaj la malnova nomo restas ankoraŭ ĉitage.

Ĉu vi scias, ke la tute internacia vorto *gas* (angle *gas*, france *gaz*, germane *Gas*, hispane *gas*, itale *gas*, ruse *gas*) estas artefarita? Ĝi estis konstruata de la holanda ĥemiisto kaj kuracisto van Helmont (1577—1644). Li prenis kiel elirpunkton la grekan vorton *chaos*, kiu estas por ni esperantistoj bone konata en la formo *ĥaoso*. La greka *chaos* origine signifas *f a ŭ k o* kaj estas parenca al la sveda vorto *gom*.

Ebbe Vilborg.

**Har Ni prenumererat för 1947?**

## SVEDA KRONIKO

### ARVIKA.

5.1. festeneto kune kun vizitantoj Amotfors kaj Amål. Prelego de Greger Andersson pri vizito en Finnlando. Hult gvidis demandokonkurson. Kafo, kanto, kanto, agrablo.

### UPPSALA.

La Esperantosocieto de Upsala dum la aŭtuno kunvenis la unuan kaj trian mardon ciumonate, ĉiuj kunvenoj multnombre vizitataj. Inter la programoj ni povas mencii la jenan:

5/11 estis programo pri I. E. L. kaj ĝia laboro. 19/11 vizitis la klubon profesoro Ramstedt el Helsingfors, maljuna esperantisto, kiu parolis pri siaj memoroj esperantaj. Rektoro Söderberg parolis pri "Edukado al humaneco". 3/12 la kluba prez. s:ro G. Norling parolis pri "La deveno de la esperantaj mondkongresoj". 17/12 la societo havis sian Luĉian festenon.

6/10 la societo havis je I. O. G. T. tre sukcesan propagandan vesperon. Rektoro Karl Söderberg parolis kaj ankaŭ aliaj membroj de la klubo prizorgis la amuzadon.

Esperantokurso por komencantoj okazas dum gvido de s:ro S. Forsstén.

7/1 la societo aranĝis internacian letervesperon, al kiu alvenis okaze de anonco amason da respondoj el div. landoj.

Vic-sekr.

### ÖREBRO.

En la distrikta kunveno en Örebro en Decembro la reprezentanto de Karlskoga povis informi, ke 100 personoj partoprenas la kursojn. En la distrikta kunveno estis reprezentantoj por, krom Karlskoga, ankaŭ Örebro, Kumla kaj Hallsberg, t. e., la kunsido estis plena. Oni serĉis kaj ricevis kontakton kun Degerfors kaj Garphyttan. Ĉeestis 35 personoj.

### MALMÖ.

11.12. Ordinara kunsido kaj poste Luĉiofestoj. — 15.12. La Klubo estis invitita al la esperanta klubo de Kopenhago por festi la Zamenhofan tagon. — 29.12. Kristnaskofesto.

### GÖTEBORG.

12.12. Kolektiĝo por Luĉiofestoj en la nova ejo de la Gotenburgaj esperantistoj. Lumbildmontris Oscar Persson, parolis Ebbe Vilborg pri La Tago de la Libro, Oskar Svantesson pri Universala Ligo. — Aŭtunsemestre kurso por Götaverkanoj, 8 anoj, infankurso en Sannaskolan, 25 anoj, en Fjällskolan 16 anoj, en Nordhemsskolan, ? anoj. — Nin vizitas skota samideanino, fino Agnes George.

### VÄSTERAS.

Nova prezidanto kaj IEL-delegito: Anna Vestberg. — Afistabulo ĉe Stora gatan. — Kurso kun 6 partopren.

## PLENA VORTARO

2:a upplagan      Pris kr. 15:—      512 sidor  
Inbunden i hållbart grönt klotband.

Ny sändning om 50 ex. nu hemkommen. Försäkra Er redan nu om ett exemplar av denna oöverträffade ordbok. Plena Vortaro är den vetgiriges bästa källa och bör ingå i varje esperantists boksamling.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO  
Fack 19071 — Sthlm 19 — Postgiro 578

## Styrelsemöte

Den 18 och 19 januari höll SEF styrelsemöte i Stockholm. Därifrån meddelas: Amikaro de SEF har under 1946 tillfört förbundskassan 2 500 kr, Amikaro de Esperanto under samma år 570 kr samt för i år 194 kr. Insamlingen till SEF:s europahjälp har tillförts 1 600 kr i kontanter och c:a 4 ton i varor. Insamlingskommittén har letts av fru Anna Alamo. Medlemsantalet vid årsskiftet var 1 142, vilket betyder en ökning av 114. Samtliga riksdagsmän skall tillställas en Deklaration för underskrift. Amikaro de Esperanto omdöpes 1947 till Esperanto-Främjandet. Postgirokonto öppnas, med adress Skövde. Mellanfolkligt Samarbete För Fred har ordnat en utställning, som under en tid framåt kommer att cirkulera bland folkhögskolor. SEF deltar i utställningen. SEF:s flygande utställning går till Uddevalla. Ny minneslista tryckes i 2 000 ex. Ansökan om lotteri på 10 000 lotter à 50 öre har inlämnats i Stockholm. Malmö förbereder något liknande. Folder på 6 sidor med reklam om esperanto tryckes i 10 000 ex. Preliminär överenskommelse med S. K. Nielsen, Fredricia, om föredragsturné i oktober. Adresslista för 1947 göres lik den för 1946. Statsanslag begäres för hr Karl Söderbergs, Uppsala, deltagande i Bernkongressen. Medlemmar av ungdomssektionen får tidningen för halv avgift. Styrelsen beslöt att till årsmötet i Gävle inkomma med förslag om obligatorisk prenumeration å förbundets tidning. Dito motion om ett representantskap inom SEF. Affischer framställs i större format än tidigare.

## Malmulto pri multo

En Aŭstrio oni restarigis ŝtatan ekzamenan komitatton por esperanto. La unua ekzameno estis aranĝata en Decembro 1946.

Kie restas SAT? demandas Aŭstria Esperantisto, proponante, ke tiu asocio same kiel IEL kaj UEA aliĝu al iu pli granda organizo kunlabora.

Oni laboras pri nova eldono de Plena Vortaro. La dua eldono estos fota reproduktaĵo de la unua.

La Franca Nacia Fervoja Societo respondas en Esperanto al ĉiuj demandoj pri la vojaĝservo en Francujo. Adreso: Bureau des Renseignements, Gare S:t Lazare, Paris.

Basic English al siaj 850 vortoj en la kompleta lingvo aldonos vortaron kun 7500 plej oftaj vortoj, ĝenerala vortaro de 25 000 vortoj kaj vortaro kun 10 000 sciencaj terminoj.

La klubo en Malmö pretigis novan ilustritan poŝtkarton por siaj membroj.

Andreo Cseh akceptis invitojn el Svisujo kaj Anglujo gvidi ĉemetodajn kursojn.

En rumana urbo Oradea Mare du stratoj estas oficiale nomitaj "Strato de L. L. Zamenhof" kaj "Strato de Esperanto".

En letero al la redaktoro dro Szilágyi informas, ke li dum 5 semajnoj gvidos kursojn en Sundsvall kaj ĉirkaŭaĵo. Estas pluraj kursoj kaj la intereso granda.

Inĝeniero Sven Alexandersson denove translokiĝos al Stokholmo. Li dum sia restado en Västerås estis prezidanto de la tiea klubo. Sur tiun postenon oni nun metis sinon Anna Vesterberg.

## VITEK SALUTAS.

Sro Vitek skribis por la februara numero salutan artikolon pro tio, ke unu jaro pasis de post lia vizito ĉe ni. Pro la malmulta spaco en la kolonoj ni ne presis la artikolon, sed ni dankas pro la saluto kaj deziras al nia ĉeĥa amiko ĉion bonan.

Red.

## Nia propagandistino



Sinjorino Alamo.

S-ino Anna Alamo informas: Mi komencos en Häl-singborg la 14-an de Februaro kaj restos en Skanio dum tri semajnoj. Tie mi vizitos la esperantajn klubojn kaj kristanajn junularrondojn kaj cetere propagandos, kie ajn mi povos enpenetri. Fervore mi intencas ataki gvidantajn personojn. Mi kalkulas je helpo de ĉiu esperantisto, kaj speciale de tiuj, kiuj povas gvidi kursojn.

Post semajno hejme, mi laŭplane iros al Jönköping, kaj poste oni ne vivos trankvile en Dalekarlio. Se estos eble, mi vojaĝos al Ĉeĥoslovakio en Majo, kaj jen mi ne diros ion plu. Ĝis revido, samideanoj!

## Praktika jurnalistoj


Por pruvi, ke Esperanto estas tre valora kaj utila en la praktiko ankaŭ kiam temas pri la gazetaro, oni starigis danan-esperantan gazetaran oficejon. Oni serĉas artikolojn de ĉiuj landoj (pri ekonomio, komerco, scienco, arto, fakoj, politiko, kulturo, junularo, turismo k. t. p.), priskribojn (pri regionoj, urboj, naturo, moroj k. s.), biografiojn pri konataj homoj, tradukitajn aŭ originalajn literaturaĵojn (novelojn, poemojn, humor-aĵojn k. s.). Ni prizorgas la tradukadon el Esperanto-kaj sendas la manuskriptojn — laŭ speco — al ĉiutagaj gazetoj, fakaj jurnaloj aŭ semajnaj revuoj. Ni ankaŭ bezonas fotografaĵojn el ĉiu mondparto. Jurnalistoj, verkistoj kaj aliaj esperantistoj, kiuj volas liveri materialon, bonvolu skribi al ni, kaj ni donos al vi ĉiujn informojn. Adreso: Redaktoro Rich. G. Nielsen, Her-l u f m a g l e, Sjælland, Danlando.

## B E L G O

serĉas svedan komerciston, kiu emas importi bonegan kuracilon kontraŭ kalveco.

Respondojn peras **Karl Wästfelt**, Cedergrens-vägen 27, Stockholm 32.

## Kruevortenigmo



**HORIZONTALALE.** 1. Flava metalo. — 4. Sento. — 6. Venenulo. — 7. Sonimitanto. — 9. Parteto. — 11. Estas la nilona ŝtrumpo, ĉu ne? — 12. Multoble. — 14. Nunulo. R. — 16. Malnorden. — 17. Mensa ĝuigilo. R. — 18. Maljuna homo.

**VERTIKALE.** 1. Ŝmir- aŭ hejtaĵo. R. — 2. La origino de la kokino? — 3. Eldonado de gazetoj. — 4. Alvenis la egiptaj akridoj. — 5. Elektra unuo. — 8. Fantaziaĵo. R. — 10. Oleodonanta arbusto. R. — 12. Ekstrema dekstra aŭ maldekstra. — 13. Plej ofta verbo. R. — 14. Se vi aldonas gramon, vi ricevas problemon. — 15. Montrovorto.

Ni lotumos unu aŭ plurajn librojn inter tiuj, kiuj sendis ĝustajn solvojn, sur aparta papero kun via adreso, al Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Kärningberget, tiom frue, ke ili estas ĉe Red. plej laste la 15-an de Marto 1947.

## Ni ne dislotos libron!

En la januara numero ni promesis disloti libron inter tiuj, kiuj atentigis nin pri kvin preseraroj. Ni nun informas, ke ni ne plenumos nian promeson! Kaj ni eĉ ne pardonpetas pro tio! La afero estas, ke Lingva-Komitato ano atentigis nin pri tio, ke estas nebene disloti nur unu libron, ĉar sub tiaj cirkonstancoj oni ĝin devas disŝiri, por ke kelkaj personoj havu po unu parton. Kaj tion ni nepre volas eviti. Anstataŭe ni petis la decidon de Fortuno pri unu persono, kiu ricevu la tutan libron. Kaj la Diino elektis S-ron Ruben Enocson, adr. Rönström, Valhallavägen 157 II, Stockholm, kiu do post ne tro longa tempo ricevos sian premion.

La starigita premia konkurso estis ege interesa por la redaktoro, kiu per ĝi ekhavis bonan memorigon pri sia senkapablo en la lingvo. Vere, kelkaj trovis "erarojn", kiuj ne estas eraroj, sed ili trovis la bezonatan minimumon.

Ĝuste rimarkas unu el la erartrovintoj, ke ne la evidantaj preseraroj estas danĝeraj, sed la pekoj kontraŭ la pura kaj logika lingvo. Se iam estos eble, ni faros artikolon pri la respondoj.

### VEGETARA GAZETO

aperos. Petu informojn de **Christian Hougaard**, St. Blichersvej 43, Aabyhøj, Danlando.

## Radio

### Dagligen:

19.00—19.15 Praha 31,41 m kaj 1961 m.  
23.00—23.15 Praha 49,92 m.

En ambaŭ la supraj sendoj de Praha raportoj ĉiuspecaj. Ĉiumonate ankaŭ informo pri la esperantista vivo en ĈSR. La enhavo de la du sendoj estas malsama.

### Söndag:

18.40—18.45 Wien II 228 m. Esperantoprogramo.

### Måndag:

20.10—? Nedanstående sändning från Warszawa?  
22.10—? Warszawa III 49,06 m. Politikaj informoj. Esperantosekcio de la Pola Radio, Koszykowa 8, Warszawa.  
23.50—24.00 Praha I 470 m. Mycket varierande program. Denna sändning äger efter den 23 febr. rum en timme tidigare.

### Tisdag:

19.50—20,00 Sofia 32,09 m. Nytt från Bulgarien. Radio Sofia, Esperanto-sekcio, Sofia, Bulgarien.  
23.50—24 00 Ostrava 325 m. Nyheter. Brevlåda. — Radiostacio, Ostrava, Tjeckoslovakien.

### Onsdag:

19.30—19.40 Regiona Stacio Ĉeĥoslovaka 280 m. Esperantoprogramo.

### Torsdag:

06.35—06.45 Wien I 506 m. Esperantoprogramo. — Aŭstria Esperantista Federacio, Neutorgasse 9, Wien I, Österrike.  
17.45—18 00 Hradec Kraálové 280 m. Esperantoprogramo.  
18.55—? Bern 31 m. Federalismo kaj paco, korta anföranden av dr Edmond Privat.  
23.50—24.00 Praha I 470 m. Se måndag.

### Fredag:

19 50—20.00 Sofia 32,09 m. Se tisdag.  
23.50—24.00 Ostrava 325 m. Se tisdag.

### Lördag:

14.00—14.10? B.N.R.O. ??? m. Brüssel, Belgien. Kurso.  
18.30—18.45 ? 3 SR (Australien) 238 m. Nyheter. Endast andra lördagen i varje månad.  
19.00—19.45 ? PRA 2 (Brasilien). Föredrag om esperanto. — Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca la Republica, Rio de Janeiro, Brasilien.  
21.00—21.30 PRI 3 (Brasilien) 49,75 m. Om livet i Brasilien. Brazila kroniko. — Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Geras, Brasilien.

Den svenska radion sände inte under januari. Man väntar besked från Radiotjänst om utsändning 10 minuter pr vecka.

## RADIOAMATOROJ INTERPAROLAS ESPERANTE.

En Sao Paulo, Brazilo, fondiĝis grupo de Esperantistaj radioamatoroj kun provizora adreso Rua José Bonifacio 233-8-Sala 802. Oni petas kunlaboron por instigi posedantojn de amatoraj sendstacioj uzi Esperanton por siaj interkomunikadoj. Oni sugestas, ke la esperantistoj kreu kontakton kun lokaj radioklubo, klarigante la utilecon de nia lingvo. Se vi havas amikon, kiu posedas sendstacion, eble vi povos aranĝi kun li pere de via helpo uzi Esperanton por konversacii kun amatoroj en Brazilo, Argentino kaj Urugvajo, kiuj jam laboras tiucele.

## OKULTAJ ESPERANTISTOJ.

Fondiĝis Akademio por diversaj okultaj fenomenoj, astrozofio, kirozofio, hipnotismo, magnetismo, psikoanalizo, mediumeco, psikoterapio, antaŭvideco. Pro manko de loko ni ne povas doni detalojn, sed espereble la interesulo povos havi informojn de sro Renato Damiani, Via Carducci 12, Trieste, Italujo.



**Nia rondo familia****ALFHILD SVEDMARK 65-JARA.**

Eksinstruistino Alfhild Svedmark, la mastrino de la Stokholma Klubo, festas sian 65-jartagon la 8-an de februaro. Plej bone estus, se ŝi mem aranĝus la feston, ĉar neniu en Esperantujo havas ŝian kapablon ĉiam esti preta preni sur sin la antaŭlaboron, kiun ĉiu festo postulas. Ĉu la Stokholma Klubo ekzistus, se ĝi ne estus havinta sian nelaciĝantan mastrinon? Eble, sed ĝi ne havus sian belan ejon, kies kostoj kaj enspezoj de la Svedmarka kaftablo estas dense kunligitaj.

Kara mastrino, el ĉiama laboro por aliaj vi ĉerpis vian bonhumoron. Ke la laboro ankaŭ post la 65-jartago ne ĉesu, ni devas deziri.

T. J.

**Korespondu****KORESPONDA CENTRO — KÖPING.**

La Koresponda Centro de SEF estas nun administrata en Köping, kaj la adreso tekstas laŭ la rubriko.

Ni havas amasojn da eksterlandaj adresoj! Vi, kiu volas korespondi kun aliaj landoj, sendu al ni letereton, **indikante aĝon, profesion, intereson, kaj aldonante 40 oerojn en poŝtmarkoj.** Ni transsendos vian letereton al konvena persono, kaj poste vi povos rekte korespondi.

Atentu, ke provizore ni ne povas sendi al vi informojn pri adresoj.

**Kursvidantoj**, atentu, ke ni havas adresojn de korespondemaj kursanoj en Hungarujo, Germanujo, Francujo, Polujo, Svisujo.

\*

Hungaraj gelernantoj kaj gestudentoj deziras fari kun svedaj gelernantoj kaj gestudentoj kulturilaton per korespondado. Por pluaj informoj alskribu s-ron Gusztáv Kovács, Ullöi-ŭt. 20, Budapest VIII, Hungarujo.

Hungaraj esperantistoj deziras korespondi pri diversaj temoj. Skribu al Francisco Andrasy, Kalman, Kiraly u. 9, Kispeszt, Hungarujo.

Prof. Fino Bianca di Falco, Via G. B. Odierna 47, Dro Salvatore Nicosia, Via San Vito 156, Sro Ventura Pasquale, Via Ciullo di Alcamo 43, Sro Guiseppe Cavalieri, Corso Wittorio Vineto 15, Sro Vincenzo Giuzmazza, Via S. Filippo 31, kaj Sro Lorefice Salvatore, Via Cav. F:sco Distefano 70, ĉiuj en Ragusa, Sicilia, Italujo, deziras korespondi.

Irlandano 26-jara, lernonta esp., dez. koresp., prec. kun svedoj kaj svedinoj, pri ĉiuj temoj. Bonvolu skribi komence angle! Jasper Hornibrook, 11, Usher's Island, Dublin, Eire.

**Svenska Esperanto-Tidningen****La Espero**

Organ for Svenska Esperanto-Forbundet

Ansvarig utgivare: *W. Wahlund*

**Redaktör:** Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Kärningberget. Telefon Göteborg 29 03 81.

**Prenumerationspris.** Helt år (12 nr) kr. 4:— . Lösnummer: 0:40. Eksterlanda abono kr. 4:50 aŭ 15 int. respondkuponoj.

**Annonspris:** 0:20 pr mm. Korrespondensannons: 1:50 (aŭ 5 int. respondkuponoj).

**Expedition:** Förlagsföreningen Esperanto (se nedan).

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a.** Postadress: Fack 19071, Stockholm 19. Expedition: Sveavägen 98, VI. (Kl. 19—21.) Telefon: 31 65 01 (förlagschef 50 88 05). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar m. m.)

**SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET** (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

**SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET**, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

**ALDONU RESPONDKUPONON!**

Delegito de IEL al La Espero esprimis plendon pri tio, ke multego da korespondantoj "forĝegas" aldoni poŝtan respondkuponon al siaj leteroj kun petoj pri la plej diversaj, ne ĉiam tro bagatelaj servoj. La delegitoj ja ne povas ĉiam el sia propra kaso pagi ĉiujn afrankojn, kaj tial ĉiuj korespondantoj, kiuj sin turnas al delegitoj, estas petataj sekvi la regulojn, kiujn starigis IEL, kaj tiuj reguloj postulas la aldonon de poŝta respondkupono al informpeto.

**Redigeringen av nummer 3,  
avslutas den 25. 2 1947**

**Y T T O N G**

är det idealiska väggmaterialet för bostadshus och industribyggnader. Tack vare den stora isoleringsförmågan ger den fuktfria och sunda bostäder. Undvik trähusets brandrisk och höga underhållskostnader. Bygg i bättre klass genom att använda Ytong.

**Bygg för framtiden ett högisoleringsthus  
till samma eller lägre pris än ett trähus.**

**YXHULTS STENHUGGERI A.B.  
Hällabrottet**

